TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 50, Numero 6, Junio 2017*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Pica vespero ĉe Esperanto Domo



Sabate la 24-an de junio ĉe Esperanto Domo okazis pica vespero. Richard Delamore faris filmeton pri tio:
https://www.youtube.com/watch?v=z2R6CkjEDDs

Venonta pica vespero kaj E-leciono okazos nur la 19-an de auxgusto je la 5a ĉe Esperanto Domo. Ĉiuj estas bonvenaj!

## Lingva Festivalo en Hunters Hill

Sekva lingva festivalo okazos en Hunters Hill sabate la 15-an de julio. Temo de la festivalo estas Esperanto. Jonathan Cooper prelegos pri Esperanto kaj aliaj konstruitaj lingvoj, Richard Delamore prezentos apon Amikumu, Adam Levy klarigos rilaton inter la hebrea kaj Esperanto.
Pli da informoj: http://languagefestival.org/hunters_hill




## Gastoj

Niaj eksterlandaj gastoj en julio estas Norberto Bludau kun edzino el Germanujo (16a de julio ĝis 22a de julio). Merkrede la 19-an de julio je la 5a ĉe Esperanto Domo okazos kunveno kun niaj gastoj. Norberto prelegos pri art-ekspozicio en Kassel, Germanio kaj montros al ni multajn bildojn interalie pri la konstruo de "Partenono" el malpermesitaj libroj.

## Aŭgusta kunveno

La venonta kunveno ĉe Esperanto Domo okazos la 6-an de aŭgusto. Richard Delamore parolos pri Amikumu.

## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj, kiuj jam remembriĝis. Se vi ankoraŭ forgesis, ne estas tro malfrue: Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join
Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

EFNSW, Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*





| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Estraranoj: Richard Delamore, John Casey

# amikumu

Amikumu estas apo
(poŝtelefona aplikaĵo),
kiu helpos vin trovi kaj kontakti
proksimajn esperantistojn –
ĉiam, ĉie!




Esploru profilojn
kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn
apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu
kaj renkontiĝu!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.

– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!

– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.
Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.
Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com
amikumu.com
www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio